


# La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

Nro 5/1984 ★ Kr 8,50



LA PUPTEATRA GRUPO T O T E M DE UPPSALA LUDAS  
"LA FAJRILLO" DE H C ANDERSEN  
Foto: Skövde Nyheter





## Esperantoförbundet

Adress: EsperantoCentro,  
Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm.  
Telefon: 08-11 74 34.

EsperantoCentro är öppet  
måndag-torsdag kl. 17-19.  
Postgiro: 20 12-3, Esperanto-  
förbundet.

### Medlemsavgift:

Direktansluten medlem 65 kr,  
ungdomsmedlem t.o.m. 20 år 35 kr,  
familjemedlem (utan tidning) 25 kr.  
Prenumerationsavgift för *La Espero*  
ingår i medlemsavgiften.

Medlemmar under 30 år får dessutom  
ungdomsförbundet SEJUs blad *ktp*.

## SEF:s styrelse

Ordförande: Roland Lindblom  
tel. 08-777 41 75,

Sekreterare: Anita Lindblom  
tel. 08-773 40 24,

Kassör: Karin Lindquist  
tel. 0589-155 31,

Märtha Andreasson, Niklas  
Gustafsson, Kerstin Rohdin,  
Birger Viggen.

### Suppleanter:

Ingemar Nordin, Åke Rohdin.

## La Espero

Organ för Svenska  
Esperantoförbundet.

Adress: EsperantoCentro,  
Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm.  
Ansvarig utgivare: Bertil Åkerberg.

### Redaktion:

Karin Lindquist (huvudansvarig)  
Vasagatan 8C, 732 00 Arboga,  
tel. 0589-155 31.

Ulf Ribers, Norra Freberga,  
591 90 Motala, tel. 0141-220 35.

Bertil Danielsson (layout)  
Årjäng, tel. 0573-105 69.

### Fotosats och tryck:

EsperantoCentro, Stockholm 1984

Manuskript sändes en månad före  
utgivningsdatum till  
Karin Lindquist (adress se ovan).

## Esperantoförlaget

### Postadress:

Box 7502, 200 42 Malmö.

### Besöksadress:

Möllevångsgatan 20 B.

Öppettider: 1 sept. - 15 maj:  
onsdagar 10-11, torsdagar 17-18.

Skriftliga beställningar expedieras  
hela året, även under sommaren.

Telefon: 040-12 20 29.

Postgiro: 578-5.

Expedition: Wivi Nilsson.

Styrelsens ordförande:

Anita Lindblom.



## Karaj legantoj

Ĉi tiu numero de *La Espero*  
estas pli dika ol ĝi kutimas esti,  
ĉar ĝi enhavas raporton pri la  
jarkongreso de SEF en Skövde  
kaj pro la ĝojiga fakto, ke la  
agado en al esperantomovado  
estas vigla.

Ĉe la redaktoro kuŝas anko-  
raŭ multaj manuskriptoj, pre-  
cipe tiaj, kiuj ne estas ligitaj al  
speciala numero. Estas rakon-  
toj de Astrid Lindgren kaj  
August Strindberg, kelkaj  
lingvaj artikoloj kaj enigmoj,  
krucvortoj kaj ŝercaj rakontoj.  
Estu paciencaj: ili aperos iom  
post iom.

Eta konsilo: se vi skribas al  
OPINIO, skribu mallonge.  
Tiam estas pli facile enmeti  
ĝin. Estas pli bone, ke vi mem  
limigu vin, ol ke mi erare  
forstreku ion aŭ eĉ ne havu  
lokon por la tuto. Dum longa  
tempo ni havis diskuton pri  
lingvaj problemoj kaj ĝi kom-  
preneble estas tre interesa. Sed  
estus ankaŭ interese legi, inter  
alie, pri ideoj kaj sugestoj, pri  
informado pri esperanto kaj  
pri la festado de la centjara  
jubileo de esperanto.

La redaktoro

Har du informerat din arbeidskamrat om att man kan  
bli medlem i SEF!

## MATLÅDOR TILL POLEN

Svenska SEL (scouternas organisation) ber oss tänka  
på våra vänner i Polen med matlådor och med ekono-  
misk hjälp för att sjuka och handikappade personer  
skall kunna komma till Sverige för rehabilitering.

SEL-representant kommer att vid personligt besök i  
Polen överlämna gåvorna till de bäst behövande.

Hjälp SEL hjälpa.

Sänd bidrag till Sveda SEL helpagadoj,  
postgiro 10 90 50-5.





## Ĉu vi permesas? La prezidanto:

### INNEHÅLL/ENHAVO


- 60 SEF-kongreso.....
- 62 Ekonomia jarraporto de SEF
- 63 Stöd för Esperanto i br. parlamentet Klubo '100-jaroj'
- 64 Eftersnack Jarkunsido de Eldona Societo
- 65 Är ni intresserade av föreläsare? Esperanta literaturo en la sveda
- 66 Portreto de honora membro
- 68 Virinoj kaj paco
- 69 Tra la lando
- 73 Opinio
- 75 Anna kaj mi gajigas homojn (El la libro de Astrid Lindgren)
- 76 Samla frimärken till NEA Esperanto och dockteater Nekrologo Kalendaro Postens bok om esperanto

La jarkongreso en Skövde estis tre bona el pluraj vidpunktoj. Montriĝis, ke la lokaloj en Helenaskolan estis tre taŭgaj por nia bezono kaj plene kontentigaj, se ni rigardas la kostojn.

La komunumo donacis monon kaj same faris la regiona administracio (landstinget). La komunuma reprezentanto, unua vicprezidanto de la komunumo, Elisabeth Granath, ne nur legis sian tekston kaj forlasis nin, sed kun vera intereso sekvis la diskutojn dum la tuta jarkunsido. Ŝi ankaŭ partoprenis en la vespera bankedo kaj vidis la pupteatran prezentadon. Post tio ŝi promesis lemi esperanton.

Mi devas diri, ke mi estis tre kontenta en Gävle pri la 'reklamo' en la gazetaro, ĉar ĉijare estis svarmo da artikoloj en *Skövde Nyheter*, sed krom tio ankaŭ aperis esperantokurso en la sama ĵurnalo. Ĉu estas koincido, ke la kluba vicprezidanto Börje Andresson estas ĵurnalisto ĉe SN?

Ĉijare la kongreso honoris du membrojn per honora membreco: Oskar Svantesson kaj Olle Olsson. Ambaŭ senĉese kaj fervore laboris dum jaroj kaj ili ofte laboris kune. Pro tio estas nature honori la meritplenon paron en unu fojo. Kiam mi skribas restas nur



kelkaj tagoj ĝis la 2a de junio, speciala tago por Oskar Svantesson, kiu festos sian 80an datrevenon. Koran gratulon!

\*\*\*

Dum la lastaj jaroj okazis kursoj diversloke por gelernantoj en elementaj lernejoj. Eĉ ŝajnas facile interesi gejunulojn studi esperanton; sed kio okazas post la kursfiniĝo? Estas evidente, ke ni preskaŭ ĉie malsukcesis ligi la ekinteresitojn. Kio mankas? Bonvolu priatenti tiun problemon kaj proponu metodojn, kiel kapti kaj kanalizi la ekaperintan intereson.

Aldone al ĉi tiu demando mi senpere pensas pri la malmultaj gejunuloj, kiuj partoprenis en Skövde, malgraŭ la ebleco logi senkoste. Ĉu tiu problemo havas samajn radikojn?

daŭrigo p. 62



# SEF-kongreso en Skövde

Denove okazis sveda jarkongreso. Ĉijare estis la klubo de Skövde, kiu aranĝis ĝin. Malgraŭ tio, ke la decido havi kongreson en Skövde venis malfrue, la klubo faris brilan laboron. La antaŭpreparoj por la kongreso meritas laŭdon. Ili bone informis kaj la urbajn instancojn kaj la lokan gazeton kaj la radiostacion. Ili eĉ kompilis belan kantanon.

Pro manko da sufiĉaj aliĝintoj oni devis kelkajn semajnojn antaŭ la kongreso ŝanĝi kongresejon de hotelo Billingen al la Helena-lernejo. Tio tamen bone funkciis kaj verŝajne neniu kongresano estis malkontenta pri tiu ŝanĝo. Sed tio kaŭzis al LKK multe da kroma laboro: trovi novan hotelon, novan kongresejon kaj aliajn eblecojn i. a. por aranĝi la kongresan supeon.

Mi mencias tion, ĉar estas necese ke ni, kiuj intencas partopreni la jarkongresojn, anoncu nin frue. Alimaniere estas tre malfacile por la aranĝantoj, kiuj devas antaŭmendi ĉambrojn. Ni pripensu por la venontaj kongresoj!

## LA KADRA PROGRAMO

Skövde estas klubo, kiu multe okupas sin pri muziko. Pro tio ili ankaŭ enkadrigis la kongreson per kantoj kaj muziko.

Dum la interkona vendreda vespero ludis grupo, en kiu kunludis la LKK-ano Gunnar Mattsson. Kiel enkonduko al la jarkunsido en la sabato ludis grupo el la muzika lernejo. Kaj vespere estis kantado de Maj kaj Petra Locher, vere altkvalitata programero. La vespero finiĝis per dancado je tirharmonika muziko.

Menciinda programero estas la prezentado de "La fajrilo" de la pupteatra grupo "Totentem" el Uppsala. La aplaŭdoj je la fino atestis, ke la ĉeestantoj vere alte taksis la spektaklon.

## EKSTERLANDAJ GASTOJ

Dank'al Spomenka Ŝtimec el Jugoslavio kaj Hardy Shöngard el Danlando la kongreso ricevis iom internacian karakteron. Spomenka, kiu laboras en Internacia Kultura Servo en Zagrebo, rakontis pri sia laboro. I.a. oni aranĝas ĉiujare pupfestivalojn, kie i.a. "To-



*Nia eksterlanda gasto SPOMENKA Ŝtimec el Zagrebo en Jugoslavio  
Foto: Skövde Nyheter*

tem" el Uppsala ludis. Estis do kara revido inter Spomenka kaj ili. Ŝi havis ankaŭ eblecon fari lecionojn kaj rakonti pri la zagreba metodo instrui esperanton. Eble estos io, kion ankaŭ ni povos uzi.

## EKSKURSO KAJ DISERVO

Dimanĉo komenciĝis per jarkunsido de Eldona Societo Esperanto. Poste la plejparto partoprenis la ekskurson en la bela ĉirkaŭaĵo de la urbo. En la preĝejo de Sankta Lukas estis aranĝita diservo, dum kiu Leif Nordenstorm predikis. La preĝejo de Sankta Lukas situas sur la monto Billingen. La aŭtobuso haltis tie dum daŭris la diservo. Laŭvole la homoj povis aŭ eniri la preĝejon aŭ ekstere ĝui de la bela naturo kaj la bela vetero.

## URBA REPRESENTADO

La komunumo de Skövde ne nur donacis monsumon por la kongresaj aranĝoj, ili ankaŭ sendis sian reprezentanton Elisabeth Granath, kiu dum la inaŭguro salutis la partoprenantojn bonvenaj al la urbo. Ŝi rakontis pri la urba historio kaj pri la nuntempaj kondiĉoj por la urbanoj. Ŝi ankaŭ partoprenis la supeon vespere. Ĝojige estis, ke ŝi, antaŭ ol ŝi foriris hejmen, petis pri membreco en la esperanto-klubo!

## LA JARKUNVENO DE SEF

Åke Blomberg prezidis dum la jarkunveno. Post kontrolo de la voĉdonrajtigitoj oni traktis la estrarajn raportojn. Nek la agada nek la ekonomia raportoj kaŭzis ian debaton. Oni aprobis ilin, same kiel la revizoran raporton.



## SEF-KONGRESO EN SKÖV- DE



Sekvis elektoj. Roland Lindblom estis reelektita prezidanto por unu jaro. La tri nunaj estraranoj Birger Viggen, Anita Lindblom kaj Märtha Andréasson ankaŭ estis reelektitaj, same kiel Ingemar Nordin, anstataŭanto.

La revizoroj Åke Blomberg kaj Bertil Bengtsson kaj la anstataŭanto Leif-Gunnar Nordenstorm estis reelektitaj kaj same la elektoprepara komisiono. Ĝi konsistas el Aino Åberg, Lisbet Andreasson kaj Karl Gustavsson.

SEF-reprezentantoj por la estraro de la Esperanto-Instituto ne estis elektitaj, ĉar okazos statutaj ŝanĝoj. La estraro de SEF ricevis la taskon nomi reprezentantojn.

### PROPONOJ

Naŭ proponoj venis por pri-trakto. Unu temis pri aldono en la statuto de SEF, kiu ebligis al SEJU pli bonan reprezentigon dum la jarkunvenoj de SEF. Oni decidis laŭ la propono, kun aldono pri aĝlimo je 25 jaroj.

Dua propono venis de Nils A Ekstén el Landskrona. Li proponis, ke SEF membriĝu en la studorganizo NBV. La jarkunsido decidis, laŭ rekomendo de la estraro, ke la kluboj estu pretaj kunlabori kun ĉiuj studorganizoj, sed ke la asocio ne estu ligita al iu ajn.

Motala Esperantoklubb sendis ses proponojn. Ili temis pri edukado de esperantoinstruistoj, koresponda kurso, poŝ-frazaro, radioelsendoj, honorigo kaj pri internaciaj geografiaj nomoj. Ĝiuj proponoj temis pri gravaj taskoj de nia movado.

+ Edukado de esperantoinstruistoj: la estraro diskutos



*La urba reprezentanto Elisabeth Granath kaj la prezidanto de SEF interbabilas dum la supeo.  
Foto: Skövde Nyheter*

kun la sveda sekcio de ILEI.

+ Koresponda kurso: la demandon jam pristudas ILEI, Esperanto-Instituto kaj Eldona. Ĝis kiam la demando estos solvita, oni povos uzi, ekzemple, "Jen nia mondo" kiel korespondan kurson.

+ Poŝ-frazaro: Eldona priatentas la demandon.

+ Radioelsendoj: necesas pli da aktiveco de la membroj. Ĉie en la lando oni petu esperantodiskojn kaj ankaŭ pri aliaj programeroj. Estis diskuto pri la eblecoj fari programerojn por la proksimradio, kiu estas plej facile persvadebla. Estis rekomendo interŝanĝi pretajn programojn inter kluboj.

+ Honorigo: estas malfacile fari pinglan honorigon pro la relative altaj kostoj. La estraro proponas anstataŭe libron.

+ Internaciaj geografiaj nomoj: ĉar la akademio de esperanto antaŭ nelonge faris rekomendon pri nomoj, oni sekvu tiun rekomendon.

Gunnar Mattsson el Skövde krome proponis memorfondadon memore al mortinta esperantisto. Oni decidis ne fari specialan fondadon, ĉar jam eblas donaci monon, kiu eniras la ĝeneralan kason.

Kaj fine venis propono de la estraro, ke la kotizo altiĝu je 10 kronoj, do por rekta membro de 65 al 75 kronoj. Oni decidis laŭ tio.

### CETERAJ DEMANDOJ

Du membroj elektigis honoraj membroj dum la kongreso: Oskar Svantesson kaj Olle Olsson. Ambaŭ estas bone konataj kaj ambaŭ dum multaj jaroj faris grandan laboron por esperanto. Ili vere meritas la honorigon.

Kaj fine oni povis ekscii, ke la venontjara kongreso okazos en Helsingborg la 16an, 17an kaj 18an de majo, kaj ke oni jam decidis pri Örebro por 1986.

Märtha Andréasson



LA EKONOMIA JARRAPORTO DE SVEDA ESPERANTO-FEDERACIO

RESULTATRÄKNING

<u>Intäkter</u>	1983	1982
Medlemsavgifter	68.629.--	50.335.--
Klubo Cent	2.810.--	5.200.--
Gåvor	30.188.70	50.228.04
Räntor	15.978.89	12.701.29
EsperantoCentro	-	8.686.71
La Espero	10.087.66	13.602.25
Esperanto-Nytt	-	2.050.11
Informationsmaterial	4.343.--	5.649.50
Insamling lön	7.150.--	15.350.--
Diverse intäkter	50.866.80	10.528.72
Bidrag Arbetsmarkn.verket	16.238.--	-
	<u>206.292.05</u>	<u>174.331.62</u>
 <u>Kostnader</u>		
La Espero	58.624.46	33.903.39
Esperanto-Nytt	-	908.99
Lokalkostnader	36.632.50	34.846.85
Verksamhetskostnader	18.017.81	18.028.14
Avskrivningar	7.696.--	7.091.--
Informationsverksamheten	40.738.55	13.037.56
Medlemsavgifter	4.103.80	6.673.--
Löner och sociala kostnader	36.858.35	17.700.--
Överskott	3.620.58	42.142.69
	<u>206.292.05</u>	<u>174.331.62</u>

BALANSRÄKNING PER DEN 31 DECEMBER 1983

<u>Tillgångar</u>		<u>Skulder</u>	
Kassa	316.43	Diverse Personer	33.007.16
Postgiro	42.380.59	Medlemsavg. 1984	3.545.--
Bank	109.331.35	Klubo Cent 1984	200.--
Inventarier	4.056.15	La Espero 1984	1.835.25
Värdepapper	8.080.70	Leverantörer	1.866.80
Upplupen ränta	15.948.76	Eget kapital	155.083.76
Förutbet. kostnader	15.423.99		
	<u>195.537.97</u>		<u>195.537.97</u>

*Roland Lindblom*  
Roland Lindblom  
Ordförande

*Karin Lindquist*  
Karin Lindquist  
Kassör

*Åke Blomberg*  
Åke Blomberg  
Revisor

*Bertil Bengtsson*  
Bertil Bengtsson  
Revisor

# Prezidanto:

daŭrigo de p. 59

Ĉu ekzistas merkato por ĉinaj lernolibroj pri esperanto en Svedio? Certe ne, sed EsperantoCentro vendis du ekzemplerojn lastatempe. Pri unu el ili mi scias ion. Cecilia Lindqvist, kiu verkis librojn pri Ĉinio, ankaŭ gvidas kursojn pri la ĉina lingvo. Ŝi ricevis donace de siaj junaj kursanoj ĝuste unu el tiuj libroj; inter la kursanoj almenaŭ du scipovas esperanton.

\*\*\*

Budapeŝto, granda kongreso — Vankuvero, malgranda kongreso. Kun granda bedaŭro oni povas konstati, ke la 69-a UEA-kongreso estos la plej malgranda de multaj jaroj. Ni svedoj kutimas veni multnombro, sed ne en ĉi tiu jaro. En 1981 pli ol 50 svedoj veturis al Brazilo, sed por Kanado ekzistas nur 15 vojaĝemuloj. Eble Kanado tro similas al nia propra lando kaj ne prezentas ion ekstran. Ĉu mi pravas, se mi divenas, ke vi ŝparas vian monon por pli alloga vojaĝcelo en 1986 — Pekino, la 71a internacia kongreso?

Mi scias, ke multaj el vi faros aliajn esperantovojaĝojn ĉismere, kaj mi vere deziras al vi bonajn travivaĵojn. Revenu poste kun forta entuziasmo al la aŭtuna esperantolaboro!

Roland Lindblom

## Proverboj

*Plej bone ridas, kiu laste ridas.*

*Pli bone pano ser butero, ol dolĉa kuko sen libero.*





Försöket att organisera intresset för Esperanto bland ledamöterna i det Brittiska parlamentet startade 1973. Medlemsantalet har vuxit från år till år och väntas växa ytterligare.

Brian Barker, som är ledare för verksamheten, har med anledning av en speciell mottagning i parlamentet, skrivit en rapport som publicerats i tidningen Esperanto-Revuo. Texten som följer är hämtad ur artikeln.

Den sista januari i år hölls en mottagning i parlamentet om Esperanto. Förutom 44 ledamöter fanns en del andra inbjudna. Där fanns Charles Wightwick, inspektör för Esperanto vid Departementet för undervisning och vetenskap, vidare John Trim, direktör för Informationscenter – Språkundervisning, Walter Morley, skolinspektör i London, professor R. H. Robins, Londons Universitet samt en redaktör för lingvistisk litteratur från Longmans förlag.

Från BBC deltog Alan Wilding, avdelningschef, som senare gjorde ett 45-minutersprogram om Esperanto.

Officiell inbjudare till mottagningen var Geraint Howells (Lib. party). Howells, som är från Wales, underströk i sitt tal att det finns gott stöd från Wales-ledamöterna vilket också framgår av att en tredjedel av dem redan ingår som medlemmar i Parlamentsgruppen för Esperanto, PGE.

Ministern för Wales, John Stradling Thomas, fanns med liksom sekreteraren för Wales-angelägenheter, Wyn Roberts.

Bland representanterna från Brittiska Esperantoförbundet fanns dess ordförande M. Austin. Hon berörde den nyligen utkomna rapporten om översättning med hjälp av dator där Esperanto används som "brospråk". Utvecklingen av detta projekt har bekräftats av EG.

En före detta motståndare till Esperanto. Allan Roberts. fanns

# Stöd för esperanto i brittiska parlamentet

med på mottagningen. Han hade tidigare i sin valkampanj varit helt emot tanken på Esperanto. Det är glädjande med politiker som böjer sig för argument. Han vill nu själv lära sig språket och begärde att det ordnas kurser i Esperanto för ledamöterna i själva parlamentet.

Deltagarna fick var sitt exemplar av "Esperanto och maskinell översättning", Av Dr Ian Kelly, ordförande i Brittiska gruppen för maskinell översättning.

Inbjudna var också de brittiska ledamöterna i Europaparlamentet. Det framkom att representant Beata Brookers tänker anordna en mottagning i Bryssel för ledamöterna av Europaparlamentet. Beata Brookers ingår i Europaparlamentets Esperantogrupp (EPEG), en grupp som bildades i slutet av 1982 och som nu är uppe i 26 medlemmar.

*(Översatt och sammanställt av Roland Lindblom, Svenska Esperantoförbundet.*

## KLUBO "100-JAROJ"

Om 2 1/2 år firar Esperantorörelsen sitt 100-årsjubileum. I alla länder kommer jubiléet att stå i centrum för all esperantoverksamhet.

UEA och många nationella förbund har redan tagit fram handlingsplaner som syftar till att sprida information om Esperanto.

Naturligtvis har vi också här i Sverige börjat arbeta på ett handlingsprogram. Vi kommer att bilda arbetsgrupper som skall syssla med information inom olika områden.

Om det skall bli något resultat av detta kommer det att kosta en del. Vi skall försöka på olika vägar skaffa dessa medel: Så t. ex. skall vi undersöka möjligheterna att ordna lotteri, vi skall tillskriva fonder och stiftelser om möjligheter att få medel också den vägen.

Jubileumsaktiviteternas omfattning är mycket beroende av tillgången på pengar. Därför efterlyser vi också tips och idéer om hur vi skall gå tillväga.

Men kära medlem – som vanligt vädjar vi till DIG om ett bidrag – ingen begränsning åt något håll.

Sänd in på SEF:s postgiro 2012-3. Märk talongen med "Klubo 100-jaroj".

*"skänk en slant så det förslår  
när vi nu snart fyller 100 år"*

Samtidigt vill vi hjärtligt tacka för nya "medlemsavgifter" till Klubo Cent. Följande personer har sänt in bidrag:

Linnea Edsenius, Nybro  
Dora Andersson, Linköping  
Hilder Södergren, Borlänge  
Anna Ericsson, Sundsvall  
Fritz Ström, Kumla  
Skellefteå Esperantoklubb



KONGRESO, KONGRESO,  
KONGRESO ...

## Eftersnack

Esperantisterna i Västsverige är alltid på alerten. Heja Märtha!

Under de senaste månaderna har — framför allt i Skövde-trakten — ESPERANTO liksom vaccinerats in i allas medvetande. Sprutorna man använt är: press, radio och, givetvis, de alltid aktiva esperantisterna. Det har varit "kongreso" hit och "kongreso" dit. Om sång bedömts vara en effektivare vaccination, har man tagit till den nya kongress-sångboken (som Skövde-klubben tillhandahåller för en kostnad av 10 kr/st. Mer än 10 ex. ger 50% rabatt. Postgiro 141944-9).

Hört på "bygda" mellan esperantist och icke-esperantist:

— Du vet ju, att vårt län, vårt vackra Skaraborg, är ett typiskt lantbrukarlän. Här förekommer därför även svinuppfödning. Och för detta ändamål utnyttjar man överloppssäd. Som kan vara korn.

Jag vill i syfte att förhindra alla missförstånd bland icke-esperantister framhålla, att detta "kongreso" hit och "kongreso" dit, som senaste

# Jarkunsido de Eldona Societo

Dum la SEF-kongreso en Skövde ankaŭ okazis jarkunsido de Eldona Societo, ĉiĝoj sub prezido de Ulf Ribers el Motala.

Ĉiuj estraranoj estis reelektitaj. Sekve la estraro por la venonta jaro denove konsistos el Anita Lindblom, Åke Blomberg, Bertil Nilsson, Åke Palm kaj Sten Svenonius. Franko Luin kaj Linnea Edsenius estos anstataŭantoj.

Estis informite pri kelkaj libroj, kiuj estas preskaŭ pretaj por eldono. "Jen nia mondo 2" estas ricevebla en formo de kopio, se oni turnas sin al Anita Lindblom. Aliaj projektoj, kiujn ni sufiĉe baldaŭ povos atendi, estas verko de Marjorie Boulton, traduko sveden de "Esperanto — ĉu eŭropa aŭ azia lingvo?" de C Piron kaj la tre atendita "ŝlosilo".

La plej grava temo dum la

tiden atackerat vårt medvetande, inte har något som helst att göra med svin, som på skaraborgsk dialekt kallas "korngresen".

Gunnar Mattsson  
LKK-kassören

kunsido tamen estis la svedesperanta vortaro, pri kiu nun laboras Franko Luin kaj Derk Dam. Tiun gravegan vortaron ni atendas jam de jaroj, kaj ĝi estas eĉ pli grava nun, ĉar la suplemento por la malnova vortaro baldaŭ elĉerpiĝos. Ni estraranoj sentis tre fortan premon kaj pravigitan kritikon pro la longa atendo de la vortaro. La problemoj tamen estas komplikaj. Franko kaj Derk laboras libervole kaj krom la vortaron ili kompreneble havas siajn profesiojn, familiojn ktp. Krome la laboro estas tiel komplikita el teknika vidpunkto, ĉar dum la jaroj ni devis uzi por la kompostado diversajn maŝinojn, ke ni ne sukcesis vere klarigi la ĝisnunan staton de la laboro. Tamen oni povas diri, ke la tuta vortaro estas kompostita, sed devas esti kontrolita, kio estas sufiĉe granda laboro.

La grava bezono de la vortaro kaj la manko de informoj pri la evoluo de la laboro sendube estigas malkontenton inter la svedaj esperantistoj. Por iom solvi tion, ni volas pli regule reveni en *La Espero* per pli precizaj informoj pri la stato de la vortara laboro.

Sten Svenonius

### ÖVERSÄTTARE TILL ESPERANTO SÖKES

I den litteratur, som nu förekommer författad på eller översatt till esperanto saknas tyvärr böcker av nu levande kända svenska författare. Detektivromaner är något som läses i stor utsträckning. Kontakt finns med en känd författare, som gärna vill ha någon av sina 15 böcker översatt. Om någon är intresserad av att översätta en sådan bok, var god tag kontakt med Esperantoförlaget eller La Esperos redaktion. Astrid Lindgrens böcker är också aktuella och därvidlag tycks ett flertal esperantister hålla på med översättningar. För att undvika dubbelarbete bör varje översättare ta kontakt med Esperantoförlaget.



# Är ni intresserade av föreläsare?

SEF kommer att fortsätta med att erbjuda utländska föreläsare. Liksom tidigare vill vi satsa på sådana föreläsare, som passar bäst att ha i klubbar och sådana, som man kan använda i skolor eller föreningar. Det är ju väldigt bra att arbeta med någon målgrupp, som man valt ut, t.ex. fredsföreningar, politiska föreningar, olika kulturella för-

eningar och ideella föreningar (FN-föreningar, Föreningen Norden, Freds- och skiljedomsföreningar, Amnesty osv). Samarbetspartnern kan då ordna olika ekonomiska och organisatoriska åtaganden. Arrangören av föreläsningsturnéerna kommer att tala om vilken typ av föreläsare det rör sig om vid respektive tillfälle.

Förfrågan till de olika klubbarna går ut via era regionsansvariga, med vilka vi tar kontakt. Det vore dock intressant och givande att få göra en liten enkät bland klubbarna, om hur ni ser på turnerandet.

Målsättningen är att ha ca två turnéer per år och på ca 10–15 platser varje gång. Det kan ju tyckas ganska lite, men torde kunna utvidgas om det fungerar bra. Det är naturligtvis många som känner personer, som skulle vilja och kunna komma hit och föreläsa. Då önskar jag att ni i god tid tar kontakt med mig och beskriver denna person; kvalifikationer, ämneskunskap, tid då han/hon kan komma, lite personalia och övrigt som kan vara till nytta.

Jag önskar också att ni så snart som möjligt skriver ner era synpunkter på följande frågor och sänder till

Kerstin Rohdin,  
Ålsta  
690 72 SKÖLLERSTA

- 1 Hur många föreläsare kan du ta emot per år?
- 2 Vad vill du att de ska prata om för typ av tema?
- 3 Kan du använda föreläsaren endast i klubben, eller kan du även arbeta med andra målgrupper?
- 4 Känner du till någon person, som kan komma hit och föreläsa? Vem?
- 5 Meddela övriga synpunkter, som du har på detta ämne.

Tack för tipsen.  
Kerstin Rohdin

## Esperanta literaturo en la sveda

En *La Espero* 4/1984 ni legis pri la graveco de tradukado nacilingven de esperantaj verkoj. En *Esperanto en perspektivo* mi tial kontrolis, kiuj esperantaj verkoj aperis en sveda traduko. La rezulto estas, ke aperis unu scienca libro, *La vivo de la plantoj* de Paul Neergaard kaj kelkaj beletraj verkoj, nome: *Mr. Tot acetas mil okulojn* kaj pluraj noveloj de J Baghy.

Post la apero de ĉi tiu listo aperis ankaŭ *De små äventyrarna* de Zora Heide en sveda traduko. Antaŭ nur kelkaj tagoj mi havis la ĝojon vidi, ke *Lyrkvännen* 1-1984 publikigis mian poeziaĵon *Mamuta ĉaso* kaj svede kaj esperante, kaj ankaŭ informis, ke mi gajnis duan premion en la Belartaj konkursoj de UEA per ĝi. Mia traduko de *Hieraŭ hodiaŭ morgaŭ kuŝas ĉe eldonejo jam de kelkaj monatoj kaj mi ricevis leteron de ili, ke mi devas atendi la finan decidon*

Kiel vi vidas, tute ne estas maleble traduki kaj eldoni esperantan literaturon. Tiun ĉi direkton de tradukado oni ofte neglektis dum la historio de esperanto. Ĝi tamen estas tre grava. Por reklami esperanton antaŭ ĝia centjara jubileo tradukado sveden de esperantaj verkoj estas grava tasko.

Estas tamen grave kunordigi la agadon. Kompreneble ne estas dezirinde, ke multaj traduku la saman libron. Estus ankaŭ avantaĝo havi eblon diskuti pri tradukaj problemoj kun aliaj tradukemuloj. Tria avantaĝo de kunordigo de tradukado estas, ke ni eble povos eldoni esperantan antologion en la sveda, kolektante tradukojn jam pretajn kaj tradukante aliajn verkojn.

Tiuj, kiuj emas kunlabori pri tradukado sveden aŭ simple volas raporti, ke ili tradukas ian verkon, tiel avertante la aliajn esperantistojn ne traduki la saman, skribu al Leif Gunnar Nordenstorm, Studenvägen 22:19, 75234 Uppsala.



# Portreto de honora membro

La jarkunveno de SEF en Skövde elektis OLLE OLS-SON el Lund kaj OSKAR SVANTESSON el Göteborg honoraj membroj.

Ili ambaŭ estas instruistoj, kiuj dum preskaŭ sia tuta vivo laboris por esperanto. La redaktorino starigis al ili kelkajn demandojn, kaj jen la respon-  
doj de Olle Olsson. En la venonta numero sekvos la respondoj de Oskar Svantes-  
son.

*Kiam vi unue konatiĝis kun esperanto kaj kiel?*

Mi fakte ne scias, kiam mi unue konatiĝis kun esperanto. Sed en la komunuma mezlernejo en Höör mi havis instruiston en la germana kaj franca lingvoj, doktoro Gunnar Freudenthal, kiu povis rakonti pri tre diversaj kaj interesaj aferoj. Iun fojon li menciis, ke ekzistas lingvo kun nur 16 reguloj. Tio estus io por mi! Mi petis mian patron aĉeti esperantolernolibron en Malmö, kaj tiam mi ricevis libron de Carl Ohlsson. Proksimume samtempe kvar radiostacioj, el la proksimume dudek, sendis kursojn por komencantoj de esperanto: en Falun Viktor Bonde, en Helsingborg Backman, en Karlskrona Ahnfeldt kaj en Uppsala Karl Söderberg. Tio estis la tempo antaŭ la monopola radio! Mi ankaŭ vidis anoncon pri senkosta koresponda kurso kun ses lecionoj. La respondojn de la lasta letero oni sendu al la rektoro Sam Jansson en la Beskova lernejo en Stokholmo. Li donis al mi la konsilon vojaĝi aŭ bicikli al Helsing-

borg, kie okazos dektaga kurso por instruistoj aranĝita de Skolöverstyrelsen.

Mia patrino havis onklon en Helsingborg, ĉe kiu mi povis loĝi. Instruisto estis redaktoro Tiberio Morariu el Rumanujo. Li instruis laŭ la Ĉe-metodo (rekta metodo). Lia tradukisto dum la unuaj lecionoj estis Gösta Ahlstrand. Ni havis kvar lecionojn ĉiutage dum dek tagoj kaj parolis esperanton la tutan tempon. Tiu rektmetoda kurso finiĝis per elementa ekzameno. Rektoro Jansson konsilis al mi kontakti ABF-n. Tion mi faris en Lund aŭtune 1929. Printempe 1930 venis la hindu Sinha, kiun mi interpretis.

*Rakontu kiel vi dum la unuaj jaroj laboris por esperanto.*

En Lund mi renkontis John Ek, instruisto por surdmutoj. Li fondis la Esperantoklubon kaj ni abonis Heroldon. Somere mi faris kurson en Höör, kie ni ankaŭ fondis klubon. La eminenta instruisto Morariu faris kursojn kaj en Lund kaj en Höör. Por la kurso en Lund kun 150 partoprenantoj ni uzis Carolinasalen. Ni ankaŭ aranĝis tre faman honoran komitaton kun multaj universitataj profesoroj, kun la rektoro de al universitato kaj la episkopo kiel unuaj.

La sinjorinoj de la klubo pretigis tre belan standardon, kiun ni uzis dum la procesio tra la urbo, kiam ni en la aŭlo de la universitato akceptis la antaŭkongreson de la Universala Kongreso de UEA en Stokholmo en 1934. Ĝi ankaŭ estis fronte, kiam la danaj kaj svedaj esperantistoj procesie



La honora membro  
Olle Olsson

foto: Karin Lindquist

promenadis al la monumento pri la batalo en Lund en 1667. Ĉijare ni festos la 40-an Dansvedan tagon en septembro.

Dum mia seminaria tempo en Gotenburgo funkciis Seminaria Esperanto-klubo, kiu bone kunlaboris kun Oskar Svantesson. Tie prelegis, i.a., aŭstro en la aŭlo por ĉiuj seminarianoj.

*Via unua eksterlanda kontakto?*

Mi ne estas certa pri la tempo. Unu el miaj kamaradoj el Höör, Emil Nilsson, korespondis kun germanino, kiu poste venis al Höör. Ŝi ankoraŭ vivas kaj ni korespondas. Certe ŝi estas unu el miaj unuaj kontaktoj. Dum la kongreso en Krakovo en 1931 mi renkontis briton. Kune ni vizitis la sinagogon tie. Ni korespondis ĝis 1983, kiam li mortis. Tria

daŭrigo sekva p.



## PORTRETO DE HONORA MEMBRO

daŭrigo de antaŭa p.

frua kontakto estis serba. Li akceptis nin ĉe la aŭtobuso de la Beograda flughaveno.

*Rakontu ian agrablan vojaĝmemoron!*

Mi havas multajn agrablajn vojaĝmemorojn, ekzemple la belega kantele-muziko en Finnlando survoje al Estonio post la Universala Kongreso en Stokholmo, aŭ la amikeca akcepto en la kampara hejmo de mia jugoslavia (serba) amiko aŭ la afabla invito al teĉceremonio jam la unuan tagon en Japanio.

*En kiuj esperantoorganizoj vi laboris/laboras?*

Mi laboris en kelkaj esperantoorganizoj kaj ankoraŭ laboras en aliaj. Mi estis membro de la esperanto-kluboj en Höör, Gotenburgo kaj Vimmerby. En Lund mi estis sekretario kaj prezidanto kaj estas honora membro. En la Studenta Eklubo mi estas kasisto. Mi dum 20 jaroj estis prezidanto de la Sudsveda distrikto de SEF; en ILEI mi estis kasisto kaj prezidanto de la sveda sekcio. Ankoraŭ mi estas revizoro de ILEI. Mi estas prezidanto de KEF, t.e. la sveda sekcio de KELI kaj membro de ĝia estraro. Mi estas membro de SEF, UEA kaj SAT. Mi estas delegito de UEA, prezidanto de Veterana Esperantista Ligo kaj membro de Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno.

*Kiom da Universalaj Kongresoj vi partoprenis? La unua, la lasta, la plej interesa?*

Se mi ne eraras, mi partoprenis kvardek Universalajn Kongresojn. La unua estis tiu en Krakovo en 1931 kune kun mia kolego kaj amiko Fritiof

Ahnfeldt. La plej interesa? Malfacile diri, ĉar ĉiu ja havas sian ĉarmon kaj siajn memorojn. Eble la kongreso en Tokio, kie la junularo ĉiam estis preta gvidi la kongresanojn en la urbo. Antaŭ tiu kongreso mi partoprenis kunvivadon en templo. Dank'al bona amiko mi vizitis multajn klubojn de la norda ĝis la suda insulo. En la suda mi ricevis pantaloneton kaj pajlan ĉapelon kontraŭ la varmo. En Hiroŝimo mi devis peti la policon pri tranoktejo, ĉar mia letero ne alvenis ĝustatempe al la delegito. En Tokio la sveda ambasadoro akceptis la svedajn kongresanojn.

en Londono en 1938 mi estis tiel malriĉa sed entuziasma, ke mi kuraĝis peti la kongresanojn dum oficiala kunveno pri mono por stipendioj al junaj kongresvojaĝantoj.

Neniam mi vidis pli gajan kongreson ol tiun en Mainz en 1958, kiam la esperantista urbestro regalis nin per kolbasoj kaj vino en sia ĝardeno.

Plej pompaj kaj luksaj akceptoj okazis post la milito en Oslo en 1952 kaj en Vieno en 1970, kiam Franz Jonas estis ŝtat-prezidento.

*Kiel ŝajnas al vi, ke la esperanto-movado evoluigis dum viaj esperantojaroj?*

Evoluo? Dum la lasta tempo en la sveda movado oni aranĝis multajn rapidkursojn, sed bedaŭrinde fariĝis nur malmultaj novaj membroj de la kluboj (Ärjäng, Nyköping, Gotenburgo, Skanio). Aŭ kion diras la statistiko de SEF? La nomoj en DN vekis eĥon. Ingemund Bengtsson en radio kaj televido ankaŭ. Ni uzu "Bandverkstan" pli multe, kaj la lokajn radiostaciojn.

*Kion vi farus anstataŭe, se vi ne okupiĝus per esperanto?*

Se mi ne estus esperantisto, mia vivo tute ne estus tiel riĉa

je kulturaj travivaĵoj kiel ĝi nun estas. Kaj kia ĝi fariĝis dank'al esperanto. Sen esperanto eble mi havus pli da tempo por legi svedajn librojn.

*Kial vi estas tiam envolvita en la esperanto-movado?*

Mi laboris kaj laboras en la esperanto-movado, ĉar mi opinias, ke esperanto estas bona solvo de la problemo pri internacia lingvo. Neniu nacia lingvo povas tiel bone kiel la internacia esperanto servi al internacia interkompreno.

*Ĉu vi havas konsilon al la nova generacio de esperantistoj?*

Respektu esperanton tia, kia ĝi estas. Ne foruzu fortojn babilante pri novaj skribmanieroj kaj strangaj ŝanĝoj. Ŝanĝoj eble venos, kiam esperanto estos oficiale akceptita kiel internacia lingvo.

Kompreneble aranĝu kursojn kaj uzu la lingvon en la praktiko, dum vojaĝoj (Svedlando-Pollando) kaj en ĉiuj internaciaj organizoj (infan-vilaĝoj, popoldancantoj ktp.).





# Virinoj kaj paco

Ŝajnas, ke virinoj estas pli pacemaj ol viroj; ili almenaŭ pli ofte dediĉas sin al paciferoj. Ili batalas kaj sin oferas por krei pacojn kaj justecan mondon. Ili aranĝas packunvenojn kaj manifestaciojn, longajn marŝojn por paco. Eble estas la prizorgado de la infanoj, kiu estas en la sango de ĉiu virino, kiu donas al la virinoj forton kaj kuraĝon kontraŭstari kaj protesti kontraŭ la brutala kaj sensenca perforto, kio milito estas.

Pripensu la virinojn en Britio, kiuj dum jaroj provis malhelpi la instaladon de misiloj! Pripensu la "frenozajn patrinojn" en Argentino, kiuj tagon post tago daŭre promenis antaŭ la prezidenta palaco en Buenos Aires por ekscii, kie estas iliaj edzoj kaj filoj! Sed ekzistas multaj pliaj.

Mi trovis poemon en la agadraporto de la UN-societo de Gotenburgo. Tiun poemon mi tre ŝatas. Lewis Nkosi kaj Gunborg Hedqvist faris la svedan tekston. Mi esperantistigis ĝin laŭ la sveda traduko. Ĝi donas bildon de virino longe for de la lukso kaj riĉeco en la modsalonoj en Parizo, Londono kaj Stokholmo, aŭ de nia trankvila vivo. Sed tamen ŝi estas virino kiel ni, fratino, kiu petas nian helpon.

## POEMO

### Rifuĝantino

Virino sen nomo, sen lando, sen amikoj.  
Virino, kies nomo estas Mizero  
Sendube tre pereonta floro.

Oni vidis vin ĉie.

Ĉiam kun elĉerpita infano en viaj brakoj.

Oni vidis vin en Judeo  
kaŭrantan sur kuŝejo de pajlo  
atendante naski infanon en la stalo,  
aŭ preta por rifuĝi de la potencaj soldatoj de Herodo.

Iun fojon oni vidis vin kuri for de bomboj en Koreujo,  
Hiroŝimo kaj Dresdono.

Iun fojon vi ŝirmis vin sub arboj en Vjetnamio,  
sed

ĉiam kun infano en viaj brakoj.  
Ĉiam tiu silenta krio interne de vi.  
Malsata, soifa, elĉerpita,  
katenigita, frostanta kaj soleca,  
perfortita kaj forlasita.

Viaj okuloj fermitaj antaŭ la lumo de la ĉielo

Iun fojon mi vidis vin en Soweto,  
koleran kiel incitita kokidpatrino,  
protektanta la alpaŝitajn infanojn.


Mi vidis vin ne plu kiel rifuĝanton, sed kiel forkuranton  
inter ĉiuj senesperaj infanoj de la mondo.

Ho, rifuĝantino!

Patrino, fratino, praavino — rifuĝantino!  
protektu ankoraŭ unu infanon sub viaj sekurigaj, fortikaj  
brakoj!

*Tradukis Märtha Andréasson*

Jen la "kapo" de filatelista gazeto, kiu aperas trifoje jare kaj kosta 15 IRK. La adreso estas: Ivar Paulsson, Skytteholmsträvan 29, 17144 Solna. Poŝtgiro 515785-4, I. Paulsson, Solna.



N-ro 62

1984 Februaro

15a jaro

Informilo de Esperanto Ligo Filatelista  
— Faka Asocio en UEA —





### Okcidenta regiono

## Virinoj kapablas

Gotenburgo gastigis inter la 3a kaj 6a de majo ekspozicion dediĉitan al diversaj virinaj kapabloj. La ekspozicio, nomita "Virinoj kapablas" allogis dum kvar tagoj ĉirkaŭ 40 000 vizitantojn.

Pluraj diversaj aktivecoj virinaj estis prezentitaj, ne nur varoj sed ankaŭ ideoj iniciatitaj de virinoj. Kadre de tiuj funkciis ankaŭ informejo pri esperanto, kiun prizorgis IVA — Internacia Virina Agado.

IVA okupis spacon de 12m<sup>2</sup>; en tiu informloko pri esperanto oni abunde disdonis flugfoliojn kaj ankaŭ prezentis provlecionojn pri esperanto, kiujn gvidis Spomenka Štimec el Jugoslavio. La ĉeesto de bulgaraj kaj japanaj esperantistinoj (Maria Paskova, Maria Taleva, Tamiko Nilssen, Akiko Snarberg) kontribuis al prezento de esperanto kiel lerta internacia komunikilo.

La esperanto-informejo ĉe la ekspozicio "Virinoj kapablas" estis unu el la informaj agadoj, kiujn oni devus ripeti. Esperanto montriĝis kiel unu el multaj ideoj prezentitaj en la kaldronego de homaj ideoj — nek malpli grava nek malpli interesa. Ĝian internaciecon

ilustris ne nur albumo prezentanta multajn el la diversaj okupoj de esperantistinoj, sed ankaŭ pluraj montritaj virinaj kreaĵoj (folkloraj pupoj kaj arĝentaĵoj produktitaj de Bulgara Esperanto-Kooperativo, polaj popolartaĵoj, desegnaĵoj de jugoslavino Miona Kresić kaj pentraĵoj de japanino Tamiko Nilssen).

La plej grandan parton de la organiza laboro faris la gotenburganinoj Märtha Andréasson, Inga Johansson, Majken Svensson, Pernilla Rein kun helpo de Andreas Nordström kaj la stokholmanino Kerstin Kristoferson.

Rezulte de tiu laboro 100 homoj enskribiĝis por novaj esperanto-kursoj kaj cento da lernolibroj vendiĝis.

Spomenka Štimec  
Jugoslavio

Aktiva informada propagando kaj alloga prezentado de Esperanto al vastaj publikaj tavoloj ĉiam devas okazi senĉese. En Gotenburgo la esperantistoj establis jam de longe intimajn rilatojn al urbaj instancoj. Urba Informa Fako, Centra Biblioteko kaj Klerigas Asocioj ĉiam estas pretaj disponigi siajn resursojn. Nur dependas de ni mem, ĉu ni estas pretaj eluzi la servojn.

Afiĉado kaj distribuado de informiloj pri Esperanto kaj efika reklamo por niaj kursoj, jen kio necesas por atingi bonajn rezultojn. En Informa Centro la gotenburgaj esperantistoj ofte prezentas ekspoziciojn. Aŭtune 1983 ni povis surbaze de ĉefe du eventoj produkti oportunan materialon por ekspozicioj: La vizito de nia parlamenta prezidanto Ingemund Bengtsson en Pekino kaj la publika Alvoko fare de 75 bonkonataj kaj bonrenomaj gesvedoj.

Sinsekve dom duonjaro, de decembro -83 ĝis majo -84, ampleksa informa materialo dum unu ĝis tri semajnoj migris de Informa Centro, Urba Ĉefbiblioteko (Fako de Lingva Scienco) al tri Regionaj bibliotekoj kaj

daŭrigo p. 70

Parto de la ekspozicio  
"Virinoj kapablas"  
Foto: Ake Rohdin





# Tra la lando

NI DEVAS ALIRI  
LA PUBLIKON!

daŭrigo de p. 69

krome al ankoraŭ tri kvartaj bibliotekoj. Principe ni havas permeson fari ekspoziciojn en tri-deko da bibliotekoj nur en Gotenburgo mem, krome en apudaj urboj Mölndal kaj Kungälv, en gravaj centroj kiel Partille, Lerum kaj aliloke proksime al la grandurbo.

Nur dependas de niaj esperantistaj kluboj kaj ne malpli de la unuopaj esperantistoj. Ĉiuj devas esti pretaj eluzi la riĉajn eblecojn, se ni deziras atingi rezultojn. En Svedio ni estas dorlotitaj, ĉie! Tamen, ni devas mem eluzi la multifacetajn eblecojn, labori, streĉi niajn fortojn kaj fidi je nia afero.

*Rivermonto*

## AKTIVECO EN GOTENBURGO

Sub gvido de Inga Johanson kaj ŝiaj energiaj kunlaborantoj okazis dum la nun pasinta studjaro serio da Intensivaj kursoj, kvarfoje aŭtune 1983 kaj same printempe 1984. En tiuj ok semajnofinoj kolektiĝis kaj komencantoj kaj progresintoj. Ili kolektiĝis jam vendrede vespere tri horojn, daŭrigis tutan sabaton, ofte eĉ dimanĉon. Dank' al tre oportuna studejo, kie pluraj ĉambroj ebligis samtempajn studojn en pluraj grupoj, tiuj kursoj plaĉis al la kursanoj kaj alportis rimarkindajn rezultojn. Ĝis nun similaj kursoj okazis 23-foje ekde 1982. Krome diversgradaj studrondoj de ordinara vespera aŭ — por pensiuloj — dumtaga modelo aktivis en la studjaro 1983/84.

## —TEDU-regionen—

# Var håller de svenska esperantisterna hus?

På alla håll i Sverige har våren varit fylld av intressanta och "moderna" esperantoaktiviteter. Gunilla Sundholm i Västerås ordnade en resa till den västtyska esperantokongressen. Den resan omfattade också som extra tillägg ett besök i Hamburg, där Elsbeth Bormann visade tysk socialvård och Paderborn, där man besökte cybernetiska institutet. Hur många deltog i den resan? Åtta deltagare från Västerås och en från Skövde! !

Förstamajhelgen var det en "internationell" träff i Tjörnarps i Skåne. Den har annonserats både i TEDU-bladet och i La Espero. Visserligen var det begränsat antal deltagare, dock inte till 9! (Tydligen det magiska talet.) Vi hade inbjudit en grupp på 20 polacker och det var meningen att vi skulle bo i fritidshus med lika många svenskar som polacker i varje hus. Men det blev ju för få svenskar! Vi bodde underbart i en bokbacke med utsprickande boklöv, vit-sippor runt borden, när vi åt utomhus med solens strålar förgyllande sjöns yta. Programmet var omväxlande med besök på olika sociala institutioner i Höörs kommun, där socialchef Stig Casserstedt ställde upp på ett sätt, som jag aldrig varit med om att en "myndighetsperson" gjort i esperantosammanhang. Han ordnade alla besök och deltog också i de flesta av dem. Själv berättade han om hur en kommun styrs och hur det fungerar i Höörs kommun. Vi besökte Bosjöklosters slott under greve Thord Bondes ledning och Frostavallens stenåldersby tillsammans med Arvid Andersson, som

med stor finess ledde oss runt i jordens och människans forntid. På söndag var det gudstjänst, som Lisbeth och Bertil Andreasson ombesörjde och de hade översatt hela gudstjänstordningen till esperanto. På kvällarna var det program av olika slag. Bertil Andreasson hade Skåneafton med en tusch av Japan, då Akiko Snarberg demonstrerade sin kimono. Malmö-klubben bjöd på underhållning och Linderöds folkdanslag hade ett högklassigt dans- och kulturprogram innan vi bjöds på korv och vi tände vårelden under vårsång och vårtal. En kväll hade vi en frågesport om Sverige och Polen, där det visade sig att polackerna kände bättre till Sverige än vi kände till Polen. Första maj låg helt i lundaklubbens händer. Man visade naturligtvis både studentlivet och Kulturhistoriska muséet.

Hjärtligt tack till de ovannämnda medhjälparna och till Ann-Christine Kron Dahl, som skötte matbeställningarna, så vi alla blev mätta och glada.

Jag tycker att denna helg utmärkt visar att esperanto är användbart för kulturutbyte på olika plan — socialkunskap, folklore, turism.

Esperanto är inte bara en hobby utan användbart i praktiska livet, vilket vi också visade på den stora idé- och handelsmässan "Kvinnor kan" i Göteborg 3–6 maj. Ett gäng göteborgare, främst Märtha Andreasson och Inga Johansson, har slitit mycket för att förverkliga deltagandet i denna upp-

daŭrigo sekva p.



## VAR HÅLLER DE SVENSKA ....

daŭrigo de antaŭa p.

märksammade mässa. Kerstin Kristoffersson och i viss mån undertecknad har också deltagit. Totalt besökte mellan 25 000 och 30 000 personer mässan. I esperantomontern var det full fart hela tiden. Spomenka Štimec från Jugoslavien medverkade med korta provlektioner och det gick åt mängder av informationsmaterial till intresserade besökare i montern.

Med viss besvikelse ser vi att inget ekonomiskt stöd influtit från medlemmarna till denna satsning, som är bland SEF:s största (tillsammans med DN-annonsen). Vi måste alla ställa upp, var och en på sitt sätt och hjälpas åt, nu när det ser ut, som om esperanto åter har vind i seglen.

Var håller de svenska esperantisterna hus? Jo, förhoppningsvis i en enad grupp för att visa esperantos användbarhet. "Enade vi stå — söndrade vi falla"!

*Kerstin Rohdin*

## RADIOINTERVJU

I början på mars sände Västerås Rundradio ett 15 minuters program om esperanto. Gunilla Sundholm intervjuades om esperantos ställning i världen idag, och så spelades det esperantomusik, bl a. Olivier Tzaut och Jan Stanislaw Skorupski. Peter, en ung kille vid VRR gjorde ett mycket bra program. Han ställde fina frågor, mer nyanserade och analyserande än vad de flesta "gamla" professionella journalister brukar göra. Det blev ett lågmält och fint program, positivt för esperanto.

# Alispeca vojaĝo pere de esperanto

dum la TEDU-regiona kunsido en Gävle en majo pasintjare ni decidis aranĝi vojaĝon al FR Germanio kaj la GEA-kongreso en Kassel. Kiel preparo por la vojaĝo ni planis seminarion en la aŭtuno kaj studtagon en la printempo, antaŭ la vojaĝo.

La esperantoklubo de Västerås havis la komision aranĝi la vojaĝon kaj inviti taugan preleganton por la dutaga seminario. Ek de la komenco ni havis la ideon, ke tiu vojaĝo ne estu nur turista aranĝo, sed ebleco por la partoprenantoj profundigi en sociaj aferoj kaj per nia vizito ni ankaŭ helpu la esperantistoj en Germanio uzi nin kiel vivantaj reklamilojn. Kompreneble la vojaĝo fariĝis ankaŭ turista. Ni vidis amason da interesaĵoj kaj la revido de multaj malnovaj karaj geamiko-koj ja estis ĝojiga kaj amuza.

Sed tion ni povis fari, krom tio ke ni aldonis al la vojaĝo multe da utila reklamo por esperanto, reklamo, kiu atingis homojn ekster nia movado, en diversaj komunumaj instancoj.

La unusemajnan vojaĝon al FRG partoprenis 7 membroj el Västerås kaj Börje Andersson el Skövde. Ankaŭ kvar membroj el Örebro intencis partopreni, sed devis rezigni pro malsano.

La relative granda nombro da svedoj vekis atenton en Kassel. Ni el Västerås estis aparte menciitaj je la solena malfermo de la kongreso, ĉar ni venis el la ĝemelurbo de Kassel. Du el ni ankaŭ reprezentis nian urbon ĉe la magistrata akcepto, kiun gvidis la anstataŭanto de la ĉefurbestro. Ni rimarkis, ke la aŭtoritatoj

en Kassel bone scias la valoron de esperanto en internaciaj kontaktoj, same kiel ĉe ni en Västerås. Antaŭ nia vojaĝo ni atentigis la komunumon pri nia vizito en la ĝemelurbo, kaj ili tuj sendis al ni financan subvencion por la vojaĝo. (Tion ili cetere faris tri fojojn dum la lastaj kvar jaroj — ni esperas, ke ili tiel rimarkas, ke esperanto vivas kaj funkcias.)

Krom Kassel ni vizitis Paderborn kaj la tiean Instituton pri Kibernetiko, kaj kompreneble la EsperantoCentron. Ĉe la stacidomo atendis nin s-ro Hermann Behrmann, s-ino Frank kaj s-ro Lobin. La lastenomita dediĉis grandan parton de la tago por rakonti al ni pri la aktivecoj ĉe la instituto rilate al esperanto. Post studvizito afabla hinddevena studento montris al ni la urbon kaj lerte rakontis pri ĝia interesa historio.

Dum la studtagoj en Medevi en septembro kaj la studtago en Örebro en marto, kaj ankaŭ inter tiuj aranĝoj, ni studis la socian situacion en FR Germanio. Ni invitis s-inon Elsbeth Bormann el Hamburgo kiel gastpreleganto en Medevi. Tiun taskon ŝi bonege plenumis, ĉar ŝi havas profundajn spertojn pri politikaj aferoj, sociaj servoj kaj virina agado. Nun estis ŝia vico gastigi nin.

En Hamburgo ŝi akceptis nin en sia laborejo, hejmo por maljunuloj. Ni petis pri tia vizito, ĉar ni volis sperti ion, pri kio ni antaŭe studis. Post rondrigardo en la hejmo ni estis invititaj al kafotrinkado kune kun kelkaj maljunuloj

daŭrigo p. 72



kaj la estrino de la hejmo. Elsbeth dum jaroj parolis kun ŝi pri esperanto, sed ŝi ĉiam estis iom skeptika. Sed nun ŝi povis mem vidi, kiel bone funkcias tiu lingvo, kaj ŝi eĉ diris, ke indus ĝin lerni. Alia, pli altranga oficisto venis al nia renkontiĝo — nome la ĉefo de la sociaj servoj de tuta Hamburgo! Elsbeth vere kaptis la okazon uzi nin kiel reklamilojn, kaj tio montriĝis sukcesa. Li rakontis al ni pri la sociaj servoj en Hamburgo, lian paroladon Elsbeth tradukis en esperanton. Miaj esperantovortoj ja ankaŭ estis tradukitaj, en la germanan.

La gaja kaj amika etoso, kiu regis dum la renkontiĝo influis ĉiujn, kaj mi asertas, ke la ĉefo ne estis indiferenta, kiam li forlasis la hejmon. Certe li neniam antaŭe estis ĉirkaŭbrakita kaj kisita de iu eksterlanda esperantistino! Nu, ni invitis lin al Svedio kaj mi scias, ke Elsbeth Bormann planas veni kun delegacio por spertiĝi pri la sveda sociserva sistemo, pere de esperanto. Nia vizito helpis ŝin tiurilate, kaj tio ne nur ĝojigas ŝin, sed ankaŭ min.

Tiel nia vojaĝo havis pli altan valoron ol turistaferoj kutimas havi. Sed ne kredu, ke ni mistrafis la amuzajn flankojn de la vizito en Esperantio! Dum la balo en Kassel ni dancis ĝis frumatene ... En Paderborn kelkaj el ni babilis kun nova amiko en la hotela trinkejo iom tro longe tiun vesperon ... Du liberaj vesperoj en Hamburgo ebligis ĝisnoktajn paroladojn kun novaj kaj malnovaj geamikoj (esperantaj kaj indiĝenaj) en ĉarmaj "knejoj" ... Dormi oni ja povas hejme, ĉu ne?

Gunilla Sundholm

## Stockholm

# Esperanta printempo

La printempo estis nur tri tagojn aĝa, la sento, ke printempas por esperanto iom pli, kiam kvindeko da personoj renkontiĝis la 7an de aprilo en Stokholmo. Tiu renkontiĝo, kun sufiĉe alloga programo, pri kiu vi jam povis legi en *La Espero*, estis aranĝita kun la celo vigligi la esperantistaron en la regiono.

Unue Lars Ångström de Svenska Freds- och Skiljedomsföreningen prezentis etan parton de nia samtempa historio, kiam li donis sian klarigon al la starpunktoj de la diversaj politikaj blokoj en la stokholma packonferenco. Poste estis ebleco por la ĉeestantoj fari komentojn kaj demandojn.

Christer Kiselman prezentis la fakorganizon ISAE (Internacia Scienca Asocio Esperantista) kaj raportis pri ĝia preskaŭ 80-jara ekzistado.

Carl Stöp-Bowitz siavice montris al eblecoj enkonduki esperanton en la sciencajn literaturon. Li admonis la


ĉeestantajn verkantojn verki en esperanto, almenaŭ resumojn.

Laste la ŝercema Harri Melasniemi atentigis nin pri diversaj reklammetodoj. Li avertis pri la danĝero de troigoj en la reklamado por esperanto kaj atentigis nin pri la graveco de bona konduto kaj aperado de la plej ofta reklamilo, la esperantisto mem.

Enkonduke kaj paŭze tri junuloj el la grupo La Ranetoj muzikis kaj kantis. Ilia kontribuo estis tre ŝatata. Tio estis ilia unua apero en esperanto, kiu enkondukis muzikan vojaĝon al Italio.

### STOKHOLMA REGIONO

Ni planas semajnfinan kurson en oktobro-novembro. Tiam ni lernos ion pri reklamado. Ni faros ekspozicion por la fenestroj ĉe EsperantoCentro. Eble ni povos akcepti partoprenon de interesitoj ankaŭ ekster la regiono.



La kongresejo en Kassel  
Foto: Gunilla Sundholm





Det här är vår insändarspalt. Har du funderingar som angår Esperanto så skriv till oss.

## Pri ino kaj viro

Mi vere konsentas kun s-ro M.M. en *La espero* nro 7/8 1983, ke nia lingvo havas erojn, kiujn la Esperanto-akademio devos plibonigi, post profunda debato inter la esperantistoj en nia gazetaro. La problemo de la "seksaj" vorto-radikoj estas grava, sed tamen ne komplika.

Sufiĉas kompreni, ke la Zamenhofa lingvo nur spegulas la sociajn konceptojn de sia tempo, kaj daŭre kaj parte, ankaŭ en nia tempo. La afiksojn "ge-" kaj "-in-", kaj la prefikse uzatan radikon "vir-" oni nur povas uzi malsame, rilate al la du kategorioj de substantivoj, kiujn mi nomas la "senseksaj" kaj la "patriarkaj" substantivoj de vivantaj estaĵoj.

Al la senseksa kategorio apartenas vortoj kiel Dio, spirito kaj similaj. Ke oni preĝas "*Patro* nia", estas nur metafora lingvaĵo kaj *ne* signifas, ke Dio estas viro. Samrajte ankaŭ la feministaj teologoj preĝas "*Patrino* nia". Plue apartenas al la unua kategorio vortoj kiel: homo, bebo, infano, amiko, persono ktp, kaj ankaŭ la profesioj, kiel: aŭtoro, ĉefo, inĝeniero, redaktoro ktp. kaj ankaŭ: iu, tiu ktp, same kiel vortoj kun la sufiksoj -ulo, -ido, -isto, -ano, -estro, kaj kun la participaj finaĵoj -ito, -ito, -oto, -anto, -into, -into. Ankaŭ ĉiuj bestoj ne estas ekse difinitaj, tial ankaŭ: akvo, lepordo, bovo ktp apartenas al la sekse neŭtraj vortoj.

Do, kiam sekso *ne* estas grava informo, aŭ nekonata, mi povas diri "ĝi" rilate al ĉiuj tiuj senseksaj aŭ sekse neŭtraj vortoj, aŭ "ŝi" aŭ "li". La prefikso "ge-" plejofte ne havas sencon, escepte eble ĉe bestoj en porinfanaj fabeloj, ekzemple pri "geleporoj" ks. En vortoj kiel: geamikoj, gesamideanoj, gejunuloj, "ge-" nur havas sencon, kiam la seksa diferenco havas *specialan intereson* en la kunestado, ĉar samideanoj, junuloj ks *jam povas enteni* personojn de ambaŭ seksoj.

Seksan distingon en tiu senseksa kategorio oni bone faras per la uzo de la prefikse uzata radiko "vir-" kaj la sufikso "-in-". Des pli bone en esperanto ne ekzistas klara limo tiu-rilate inter radikoj kaj afiksoj. Grava estas la ebleco distingi inter "virhomo" kontraste al "homino", kaj inter "virkoko" kaj "kokino", ktp. Ke tio eblas per malsimilaj afiksoj, estas ja la pikanta diferenco inter la du egalrajtaj homoj, nome la *ino* kaj la *viro*.

Mi bone komprenas, ke multaj legantoj (do de ambaŭ seksoj!) subkomprenas viran sekson en vortoj kiel: amiko, junulo, inĝeniero, urbestro, leganto ktp. Tamen tio nur (!) estas sekvo de la tre forta koncepto-influo de la naciaj lingvoj kaj la fakto ke inĝenieroj, urbestroj ktp plej ofte estis, kaj daŭre estas, viraj.

Ni tamen *ne* troigu la uzon de la afiksoj "vir-" kaj "in-". Ne

estas *devige* uzi ilin. Diru: juna viro (ne virjunulo), s-ro redaktoro (ne virredaktoro). Pli facile estas diri f-ino inĝeniero, s-ino ministro, s-ino profesoro, ina soldato ol tiujn vortojn kun la sufikso "-in-", kiam vi nepre volas indiki la sekson.

En la dua kategorio, tiu de la patriarkaj substantivoj, la *virino* estas la seksa kontrasto al *viro*. La "ino" estas sufikse formata el la radiko "vir-", kaj tion ni foje trovas ankaŭ en naciaj lingvoj. Tiu fenomeno devenas el la hebrea/kristana kaj islama kulturaj sferoj kaj, pli precize, ni retrovas ĝin en la Biblio.

Laŭ la Genezo-libro, en la dua ĉapitro, verso 23, kie Adamo, la unua homo, post la kreo de sia ino diras: "Jen nun ŝi estas osto el miaj ostoj kaj karno el mia karno; ŝi estu nomata Virino, ĉar el Viro ŝi estas prenita".

La hebrea lingvo konfirmas tion, ĉar viro = "isj" kaj virino = "isja". Tiu vir-deveno kaj viro-dependeco de la inoj pludaŭris ĝis niaj tagoj, kaj Zamenhof, bone konanta la hebrean lingvon kaj kulturon, uzis tiun lingvan econ por fari aron da inaj vortoj, kies radikoj estas nur vir-seksaj. Krom "viro" ni trovas: patro, filo, knabo, bubo, frato, avo, onklo, sinjoro, fraŭlo, edzo, fianĉo, reĝo, princo, kuzo, nevo, nepo, orfo, kaj aliaj. La inajn vortojn oni facile, kaj patriarke (!), faras per la sufikso "-in-", kaj ankaŭ la prefikso "ge-" estas bone uzebla. La prefikso "vir-" tamen *ne* estas uzebla al tiuj radikoj. Tio nur faras sensencaĵon.

daŭrigo p. 74



## "Ne tuŝu la fundamenton!"

Estas mirige, parolante pri la neŭtraleco de esperanto, ke ni neniam kritike observas, ke por la inoj ne ekzistas propraj vortoj, nur viro-devenaj. Vere, ĉi tie ni bezonas pluevoluigi nian lingvon.

Iu nun demandas: Se *virino* estas la seksa kontrasto de *viro*, kaj inter la patriarkaj vortoj, kaj *ino* estas la kontrasta sekso de la *viro* en la kategorio de la sekse neŭtraj vortoj, kio do estas la diferenco inter *ino* kaj *virino*? Tiu demando eble estas iom komparebla al iuj politikaj duoblaj nomoj, ekzemple: kio estas la diferenco inter Cejlono kaj Srilanko, aŭ inter Rodezio kaj Zimbabvo? Do, eble "ino" kaj "virino" estas du esprimoj por diferencaj konceptoj, nome egalrajteco inter seksoj, kontraste al la patriarkismo. Tion ankaŭ spegulas la Genezo-rakonto. Ni legu en la Biblio la unuan ĉapitron, verson 27: "Kaj Dio kreis la homon (= Adam) laŭ Sia bildo, laŭ la bildo de Dio Li kreis lin, en formo de [hebree: zaĥar = vir-sekso] kaj [hebree: nikewa = in-sekso] Li kreis ilin". Bedaŭrinde Zamenhof tradukis ankaŭ ĉitie, uzante la patriarkan sistemon, per "viro" kaj "virino", kio ja ne estas laŭ la originalo.

### KELKAJ VORTOJ PRI "FAR"

Jen alia afero, ĉar al s-ro M.M. ne plaĉas la prepozicio "far". Almenaŭ s-ro E. Carlén en "Svensk Esperantogrammatik" p. 70 — 71. montras la uzon de la prepozicio "far". anstataŭ "fare de". La kaŭzo estas ne nur, ke "far" estas pli simpla ol la du aliaj formoj

En *La Espero* 7-8/1983 mi iom pritraktis la proponojn enkonduki masklan sufikson en nian lingvon. Mi menciis la proponojn -iĉ, -im kaj -ur kaj demandis pri aliaj.

Iuj personoj pledis por la vortero -ir kiel maskla sufikso, kaj post cerbumado kaj komparado mi volas aliĝi al ili. La vortero -ir aludas la vorton vir', kaj ĝi sufiĉe malsimilas la sufikson -in. Cetere jam Zamenhof trovis -ir kaj logika kaj oportuna kiel maskla sufikso.

En *La Espero* 2/1984 Eugen Rytenberg rimarkigis, ke esperanto funkciiis dum preskaŭ cent jaroj sen maskla

sed ankaŭ ke la prepozicio "de" havas tro multajn signifojn. Tial oni bone diras: "la libro de s-ro A. far s-ro B". Tiamaniere ni facile distingas inter la posedanto kaj la verkisto de ĝi. Pensante pri la radiko/prepozicio "far", estas konstateble, ke ankaŭ la verbaj derivaĵoj "fariĝi" (kaj "estiĝi") estas malfacile koncepteblaj superfluaĵoj. Estas inde anstataŭigi ilin per la verbo "iĝi", aŭ la neologismo "viridi", kiuj jam sole estas samsignifaj kiel la ĝis nun uzataj "fariĝi" (kaj "estiĝi").

Pri ĉitiu demando kaj nombro da lingvaj problemoj aktualaj oni ankaŭ studu tre legindan broŝuron "Por multoble plivastigi nian movadon ni ĉiam uzu nur esperanton tre facile kompreneblan". far A. Lienhardt.

Chris B. Vos

sufikso kaj ke tiu "maljustaĵo" ekzistas ankaŭ en, ekzemple, la sveda lingvo. Nu, sed mankoj en nelogikaj naciaj lingvoj ne pravigas tiajn en logika internacia lingvo. Kaj se esperanto longe funkciiis sen maskla sufikso, ĝi povas pli bone funkcii kun tia sufikso.

Precipe kiam oni priskribas bestojn, sed ankaŭ plantojn, maskla sufikso estas bezonata. Ekzemple: regolfiloskopo estas birdspecio kaj povas esti regolfiloskopino aŭ regolfiloskopi-ro. La vorto regolfiloskopo ŝajnas kaj stranga kaj erariga. Ankaŭ por derivaĵoj maskla sufikso estas preskaŭ necesa. 'Etulo' povas esti infaneto, ekzemple etulino. Sed ĉu mi vere povas uzi la vorton viretulo? Brrr.

Nun pri la titolo, kiu estas la vortoj de Rytenberg. Post la kongreso en Bulonjo-ĉe-maro en 1905 esperanto asimilis multajn vortojn kaj vorterojn. Kelkaj el ili estas nenecesaj. Uzo de ankoraŭ unu bezonata vortero, kiel ekzemple la sufikso -ir, ne ŝanĝas la fundamenton, kaj ĝi tute konformiĝas al la plena gramatiko de esperanto.

Fine mi petas pri pardono, ĉar mi skribis, ke la ĉ-sonoj malbeligas la lingvon. La gusto ja ne estas io difinebla, kaj ĉiu havas sian guston. Mi devus esti skribinta: laŭ mia gusto la ĉ-sonoj malbeligas la lingvon. Mi spertis, ke multaj personoj konsentas kun mi.

Malte Markheden





## Anna kaj mi gajigas homojn

1

Post kiam ni aŭtune komencis la lernejon, la instruistino unu tagon diris, ke ni ĉiam klopodu gajigi aliajn homojn. Ini neniam faru tion, kio malgajigas homojn, ŝi diris. La saman tagon posttagmeze Anna kaj mi sidis sur nia kuireja ŝtuparo kaj interparolis, kaj tiam ni interkonsentis, ke ni tuj komencu gajigi homojn. Sed plej malfacile estis, ke ni ne precize sciis, kiamaniere tio okazu. Ni decidis komenci kun Agda, nia hejmhilpantino. Ni iris al ŝi en la kuirejon. Si estis okupita per frotlavado de la planko.

— Ne alpaŝu la plankon, kiam ĝi estas malseka, ŝi diris.

— Agda, mi diris, ĉu vi povus diri ion, kion ni povus fari por gajigi vin?

— Jes, se vi volus forlasi la kuirejon dum kiam mi frotlavas, mi estus gajega, diris Agda.

Ni eliris. Sed ne estis precipe amuze gajigi homojn tiamaniere. La instruisto certe ne opiniis tiel.

Panjo estis en la ĝardeno rikoltante pomojn.

Mi iris al ŝi kaj diris:

— Panjo, diru ion, kion mi povas fari por gajigi vin.

— Mi jam estas gaja, diris panjo.

Tio ja ŝokis nin. Sed mi ne volis cedi, sed diris:

— Sed eble mi povus fari tiel, ke vi fariĝus eĉ pli gaja.

— Vi ne devas fari ion ajn, nur daŭrigu esti mia bona knabino, diris panjo. Tiel mi fariĝas tute sufiĉe gaja.

Tiam mi reiris al Anna, kaj mi diris al ŝi, ke nia instruistino eĉ ne suspektis, kiom malfacile

estas trovi iun, kiun oni povus fari gaja.

— Ni provu kun avo, diris Anna.

Kaj ni iris al avo.

— Ĉu estas miaj etaj amikinoj, kiuj venas, diris avo. Nu mi vere ĝojas.

Pensu. Tio estis ja ankaŭ ĉagrene. Ni ja nur estis venintaj tra la pordo, kaj jam avo estis gaja. Tiamaniere ja restis al ni nenio por fari.

— Ne, avo, diris Anna, nun ne diru ke vi jam estas gaja. Ni volas ion fari por ke vi fariĝu gaja. Vi devas helpi al ni trovi ion, ĉar la instruistino diris, ke ne igu aliajn homojn gajaj.

— Eble vi povus legi por mi la gazeton, diris avo.

Jes, kompreneble, tion ni certe povus, sed tion ni ja ofte faris, kaj tio tute ne estus io eksterordinara. Subite Anna diris:

— Vi, kompatinda avo, kiu konstante sidas ĉi tie en via ĉambro, ĉu vi ne fariĝus tre gaja se ni promenus kune kun vi?

Avo ne aspektis precipe gaja pro tiu propono, sed li promesis kuniri promeni. Kaj ni ekiris. Anna kaj mi iris ambaŭflanke de avo kaj gvidis lin, ĉar avo ja ne povas mem vidi kie li iras. Ni rondiris kun li la tutan Bruvilanĝon kaj parolis kaj rakontis al li tutan tempon. Komencis venti kaj iom pluvi, sed tion ni tute malatentis, ĉar ni estis fikse decidintaj, ke ni gajigu avon.

Fine avo diris:

— Ĉu vi ne kredas, ke nun sufiĉas? Mi ŝatus enlitigi.

Tiam ni kondukis avon reen al lia ĉambro, kaj li tuj senvestigis sin kaj ekkuŝis en la liton,

kvankam ankoraŭ ne estis vespero. Anna helpis kaj prizorgis ke li kuŝu oportune. Avo aspektis iom laca. Antaŭ ol ni foriris Anna diris:

— Avo, kio estis la plej amuza travivaĵo por vi hodiaŭ?

Ni ambaŭ kredis, ke li diros, ke la promenado estis la plej amuza, sed avo diris:

— La plej agrabla en ĉi tiu tago, jes, certe estis kiam mi povis rampi en mian bonegan liton. Ĉar mi sentas min lacega kaj stranga.

Poste Anna kaj mi devis fari niajn hejmtaskojn kaj ne havis tempon ĝojigi aliajn homojn en tiu tago. Ni ja ankaŭ ne estis tute certaj ke ni ĝojigis homojn en la ĝusta maniero, kaj tial ni decidis demandi nian instruistinon la sekvantan tagon, kiel oni efektive devus fari. La instruistino diris, ke ofte necesas tre malmulte. Oni eble povus kanti iomete por iu, kiu estas sola kaj malsana, aŭ doni floron al iu, kiu neniam kutimas ricevi florojn, aŭ afable interparoli kun iu, kiu sentas sin hontema kaj embarasita.

Anna kaj mi decidis ke ni provu denove. Kaj en la posttagmezo mi aŭdis kiel Agda rakontis al panjo, ke Kristin en Istmo estas malsana. Mi tuj kuris al Anna kaj diris:

— Kian bonŝancon ni havas. Kristin en Istmo estas malsana. Venu, ni iru al ŝi por kanti.

(La rakonto daŭriĝos en sekva numero)





## SAMLA ANVÄNDA FRIMÄRKEN

TILL UEA

Vi kan alla hjälpa till att lämna extra tillskott till UEA:s kassa. De tar tacksamt emot alla slags använda frimärken, som sedan kan säljas i olika länder.

**JAN STRÖNNE,**  
Amiralsgatan 36,  
211 55 MALMÖ

har åtagit sig samla använda frimärken för vidarebefordran till UEA som gåva från SEF.

Klubbar kan lämpligen utse någon person att samla in frimärken från medlemmarna. Direkta medlemmar kan sända direkt till Jan Strönne.

Klipp av frimärken från kuvert eller kort med marginal så att frimärket inte skadas. Om Du har tid över, kan Du blöta upp frimärken och skilja dem från underlaget, men det måste också ske med försiktighet så att det inte skadas.



KLIPP UR POSTENS TIDNING

"SKRIV & BERÄTTA!"



### Postens bok om esperanto

Nu när intresset för esperanto – världens enklaste språk – börjar ta fart igen har vi på Posten bestämt oss för att ge lite draghjälp. Snart kommer vår lilla brevställare för alla som vill lära sig grunderna i vad alla esperantister hoppas ska bli ett stort världsspråk. Mer information i nästa nummer av Skriv & Berätta!

## ESPERANTO OCH DOCKTEATER

Det var inte bara i Skövde som esperanto var aktuellt i dockteatersammanhang. Samma helg höll Svenska Dockteaterföreningen sitt årsmöte i Göteborg. Under söndagen medverkade Spomenka Štimec med att berätta om dockteater i Jugoslavien. Tolkade till svenska gjorde Märtha Andreasson.

## Kalendaro

**21-30 junio**

52a Internacia kongreso de blindaj esperantistoj, Italio

**6-13 julio**

Bicikla karavano Dover-Swanwick, Britio

**13-20 julio**

40a Internacia junulara kongreso, Swanwick, Britio

**8-20 julio**

Somera esperanto-lernejo kaj junulara esperanto-lernejo. Jasov, Ĉeĥoslovakio

**21-27 julio**

Turisma semajno, Tatan, Ĉeĥoslovakio

**21-28 julio**

69a Universala kongreso de esperanto, Vankuvero, Kanado

**18-25 aŭgusto**

22a Pola esperanto-kongreso, Szczecin, Pollando

**19-31 aŭgusto**

Internacia junulara seminario pri la kooperativo, Kaposvar, Hungario

**ĈIUMONATE**

Internacia esperanto-kursejo, Bulgario